
PAIVA NETTO

# Dio, Ekvacio kaj Amo



# Dio, Ekvacio kaj Amo

***Improviza parolado de Paiva Netto en la jardeko post 1980***


João Preda

José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radikronikisto, verkisto, komponisto kaj poeto. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Eminenta lernanto de Kolegio Petro la Dua, li estas aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Internacia, Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Plej granda malhelpo al granda kuniĝo inter Religio kaj Scienco, kiuj estas fratoj, estas la plua restado, sur la podio de scio, de ia homforma dio, kiu malhelpas ne nur laboratoriojn, sed ankaŭ altaron.

**Guerra Junqueiro** (1850-1923), batalema portugala poeto, kiu ankoraŭ hodiaŭ kaŭzas timan silenton aŭ polemikon, prikantas la Dian Dion kontraŭe al la homeca dio, venĝema kaj sangsoifa, per ĉi tiuj kortuŝaj versoj de *La Merlo*, kiam maljuna abato, emociita de la morto de la birdo, kun kiu li ĉiutage malpaciĝis, kaj de la morto de ĝiaj idoj, ekkrias:

*"(...) Senmakula kaj sankta estas ĉio!/ Kaj en ĉia mizero, sama ploro/ Kaj estas sama kri' en ĉiu koro./ La tutan universon Di' animis./ Ĉio vivanta ridas, kantas, ploras.../ Ĉio devenis de la sama marĉo,/ Kiun sama aŭroro elpurigis./ Ho Vi, mistero sankta de la vivo,/ Nur nun mi vin komprenas / Vidante la animon samesencan,/ Ĉu pro dolor', pro amo, pro naivo,/ Ĉu ĝi gardas lulilon, ĉu nur neston!/ Nur nun mi scias, ke en ĉiu kreito,/ De la plej bela ĝis la plej malpura,/ Ĉu je kolombo, ĉu je feroculo,/ Enloĝas Dio, revas*



Photos.com

*Di', murmuras!... (...)/ Pli granda estas Di' ol mi supozis..."*

Ĝuste pensis la abato prezentita de la aŭtoro de *La Muzo Libertempas:* — Pli granda estas Di' ol mi supozis...

Li ne havas homan formon. Ne temas do pri tio, kion tiel mallarĝe pensas iuj homoj pri Li. La Homo ankoraŭ ne vidas Lin, sed povas senti Lin kiam li vere amas, kaj de Li foriras, kiam li malamas. Se paroli poezie, Dio estas ia Sublima Ekvacio, kies rezultato estas Amo.

Ĉar la Universo projektas kolosan poemon laŭde al agado kaj al beleco, tial en ĉi tiu artikolo bonvenas tiu apologio, kiun pri Eterneco faras la granda franca pensulo **Victor Hugo** (1802-1885):

*"Moviĝas ĉio, arde, klopode, gravite;/ Elvolviĝas, altiĝas, vivas, renaskiĝas;/ Nenio devas resti en surda obskuro./ Animo en ekzilo survojas eterne,/ proksime al ĉielo, kiu vokas nin./ Al milduloj mildiĝas ardo de sufero./ Kruda ombro fariĝas aŭroro feliĉa,/ la homo kaj la besto anĝeloj fariĝas;/ kaj per kulpelaĉeto, ŝtuparo al justo,/ kun parto de mallumo, kaj parto de helo,/ senĉese, sub lazuro de bela ĉielo,/ atingas l' universon dolor' kaj feliĉo".*

Avangarda Scienco, kiu altigos la Homon al konsideroj, nuntempe nekoncepteblaj al la plej multaj homoj, turnas sian rigardon al la Spirita Mondo.

**Alziro Zarur** (1914-1979) elektis parolojn de pluraj altranguloj en la scienca kampo, en sia *Proklamo de Religio de Dio,* interalie:

**Einstein** (1879-1955) – *"Homo, kiu konsideras sian ekzistadon kaj tiun de siaj similuloj sensencaj estas ne nur malfeliĉa: li estas preskaŭ nekapabla vivo".*

**George Davis Snell** (1903-1996) – *"Se Universo povus krei sin mem, tiam ĝi enkorpigus la potencon de Kreanto, kaj ni estus devigitaj konkludi, ke la Universo estas Dio".*

**Edwin Conklin** (1863-1952) – *"La ebleco, ke la vivo ekestis hazarde, estas komparebla al la ebleco, ke kompleta vortaro rezultis de eksplodo ĉe presejo".*

**Compton** (1892-1962): *"Ne povas esti konflikto inter Religio kaj Scienco: ĉi tiu lasta estas nura fidinda metodo por konstati Veron".*

La eksa Ministro de Kulturo de Brazilo, **Gilberto Gil,** per sia elstara sentemo, versumas en kunlaboro kun la kantisto kaj komponisto **Arnaldo Antunes**: *"Scienco ne antaŭeniras / Scienco atingas / Sciencon mem".*

Kiom da grandiozo Dio-Scienco proponas al nia esplorema prudento!

La viglega kinreĝisoro **Jean Cocteau** (1889-1963) tre spirite invitas nin al aŭdaco: *" Ne sciante, ke la tasko estas neebla, li venis kaj plenumis ĝin".*

Kono ne havas limojn. Kio estus al ni sen Scienco?!

Avangarda Scienco, kiu altigos la Homon al konsideroj, nuntempe nekoncepteblaj al la plej multaj homoj, turnas sian rigardon al la Spirita Mondo.

## HELPU VI LBV-on AMPLEKSIGI ĜIAN AGADON!

Donu monhelpon per unu el la jenaj bankoj:

HSBC — Bankokodo: 0343 - Kontnumero: 63275-24

SANTANDER — Bankokodo: 0239 - Kontnumero: 13002754-6

# LEGIO DE BONA VOLO

www.bonavolo.com

**Centra Sidejo**

**Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP Brazilo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500**

**Argentino:** Av. Boedo, 1942 • Boedo • Buenos Aires CP C1239AAW • Tel.: (+5411) 4925-5000 • **Bolivio:** Calle Asunta Bozo, 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • Casilla de Correo 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • **Usono:** 20 Calumet Street, 1st floor • Newark/NJ • Zip Code 07105 • Tel.: (+1973) 344-5338 • **Paragvajo:** Calle Curupayty, 1452 c/ Mayor Bullo • Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/03 • **Porto/Portugalio :** Rua Alexandre Herculano, 355 • Freguesia da Sé • CP 4000-055 • Tel.: (+35122) 208-6494 • **Coimbra/Portugalio:** Rua do Arnado, 3 • CP 3000-060 • Tel.: (+35123) 983-8133 • **Lisboa/Portugalio:** Rua D. Antonio Caetano de Sousa, 15 • D. Benfica • CP 1500-222 • Tel.: (+35121) 715-4890 **Urugvajo:** Av. Agraciada, 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790

## Templo de Bona Volo

**SGAS 915 • Lotes 75/76 • Brasília/DF • Brazilo CEP 70390-150 • Tel.: (+5561) 3245-1070 www.tbv.com.br • www.boavontade.com**

**www.paivanetto.com.br**

Versão em Esperanto do folheto “Deus, Equação e Amor”